

Sudamerika Kolonio  
por Rifugantoj en  
Kolombio

Centra Oficejo :

11, ABBEY ROAD, ENFIELD, MIDDX., ANGLUJO

E

SS

M  
5865



# DIRAĴO

de

## RUDOLPH P. MESSEL

Januaro 1939

Kiam mi vizitis la Pital kolonion en Januaro 1938 mi trovis la koloniantojn preskaŭ mortmalsanantaj. Ili suspektis unu la aliajn kaj ankaŭ min, rigardantaj min kiel spionon "spionanta pri la malriĉeco de la lando". Estis 31 homoj, enkalkulante virinojn kaj infanojn, kiuj estis senescepte ĉifonitaj, kavvangaj kaj malgajaj.

Kelkaj jam konstruis iomsolidajn domojn el koto miksitaj kun bovinsterko kaj cindropolvo, kaj tegmentoj el ondumita fero. Estis du tiaj kiam mi alvenis, unu enloĝata kaj la alia ankoraŭ ne finita. La koloniantoj nekapablaj konstrui tiajn domojn loĝis en lignaj domoj, faritaj per starigo de stango ĉe ĉiu angulo kaj alfikso de novetranĉitaj lignaĵoj de stango al stango per najloj. La tegmentoj estis el stano tiel fiksita por turni la pluvon al tranĉejo malantaŭ la domo. Ĉiu domo havis pordon kaj fenestron kovritan per metalreto. Tio malhelpis eniron de moskitoj sed ne elbaras la pluvon kaj venton. La lignaj tabuloj ĉe la muroj ne bone kuŝas kaj la vento kaj pluvo eniras inter ili. La planko de la domoj estas el premita tero. Unu kolonianto konstruis sian domon sur stangoj kiuj tenas la domplankon du futojn super la tero, la planko estante farata el ligno. Tio havas la avantaĝon esti pli seka ol la tero sed perdo de sukerpecoj, tranĉiloj, k. t. p. kiuj trafalis la interspacojn, iom deprenis de la avantaĝo. La litoj estas lignaj kaj tre malkomfortaj; kaj la manĝoj okaze de mia unua vizito, oranĝoj (kostis kvaronpencon por 4) kaj io cetera, kiel maizo kaj "yuca", kiuj estis malkare aĉeteblaj — aŭ pethaveblaj. La manĝebla parto de "yuca" konsistas el granda, blanka

radiko; tiom sengusta kiel napo. Ĝi estas kreskigata ĉe en Kolombio kaj uzata por nutri la porkojn.

Mi sciigis ke la koloniantoj estis atendintaj plibonajn kondiĉojn, kaj konsekvence estis iom malkontentaj, kaj mi opiniis (kaj nun scias) ke la malkontento estis pliakrigita de manko de nutraĵoj.



La "Tractor" funkcia en la Kolonio

Pere de amikoj en Londono kelktempa helpo estis ebla pri manĝaĵoj sed estis klare ke io pli fundamenta bezoniĝis por malhelpi la disrompon de la kolonio. Mi sentis ke la kolonio meritis penadon daŭrigi ĝin, unue ĉar komenco jam fariĝis kaj due, ĉar ŝajnis ke post provizo de sufiĉaj manĝaĵoj kaj necesaj iloj, estis nenia kialo por dubi ke la tero jam posedita de la koloniantoj povos produkti abundan rikolton.

Ni kolektis £900 kaj mi reiris al Pital en Julio 1938, decidinta meti la kolonion sur produkteblan bazon. Mi esperis ke post aĉeto de "tractor", necesaj semoj kaj fruktigilojn (sterko, k. t. p.), kaj pretigo de sufiĉe da tero antaŭ ol venos la pluvoj mi povos lasi la kolonion en stato de relativa prospero.

Ni komencis per £900; la "tractor" (Allis Chalmers 30 ĉevalpova, raŭpa modelo) kostis 5,000 kolombiajn pesojn, t. e. pli ol duono da nia mono. Ni devis ankaŭ aĉeti plugilon (diskotipan) kaj erpilon. Restis ankoraŭ ĉirkaŭ 4,000 pesoj kaj per tio la koloniantoj (nun nur 24 personoj) devis subteni la vivon ĝis produkto kaj vendo de la rikoltaĵoj, kaj aĉeti semojn, sterkon, kaj por la maŝinoj petrolon kaj oleon.

Unue ni prientis la koston de vivrimedoj kaj decidis ke minimume ĉiu kolonianto devas havi 50 centavojn potage (egale 1/- anglan). Ĉiu ricevis tiom escepte 5 needzigitaj kiuj, pro ke ili devis kuiri por si mem sole, bezonis plu kaj ricevis 60 cojn. Por infanoj ni pagis en centavoj 45 por unua infano kaj la dua, kaj pluaj infanoj po 40 por ĉiu. Laŭ tiu bazo ni kalkulis ke la kolonio povos ekzisti ĝis Julio 1939 je kosto de 3,000 pesoj. Tiu sumo, kvankam ĝi estis adekvata por subteno de vivo, postlasis nenion por neatenditaj okaz antaĵoj kaj malmulton por administra kapitalo. Preskaŭ tuj post mia alveno unu kolonianto fariĝis serioze malsana. Nia kuracisto diris ke la malsano plejkredeble estos morta, tamen, estas iometa espero ke oni povus kuraci lin per radiumo en Bogota kaj eble savi la vivon. Ni sendis lin al Bogota kie li ankoraŭ vivas subtenata de nia kaso. Dua kolonianto estis mordata de insekto kaj devis iri en hospitalo en Popayan kie li restis 6 semajnojn. Plaĉas al mi diri ke li plene resaniĝis kaj nun estas denove en la kolonio. Aliaj malpliseriozaj malsanoj okazis kiel venenigitaj manoj kaj dentdoloroj, la kosto de kiuj ni devas pagi el la mono vere bezonata por administraj elspezoj de la kolonio por la venonta jaro.

Tiam ni devis decidi ĉu lasi la "tractor" on neuzata kaj nur ekzisti je nivelo de 50 c-oj, ĝis la tuta monsumo eluziĝis, aŭ alternative elspezi necesan sumon por petrolo, semoj (precipe terpomoj) kaj sterkon kaj laŭeble kulturi la teron. Se ni elektus la lastan planon ni riskus seriozan mankon da mono semajnojn antaŭ ol venos la rikolto. Malgraŭ senduba risko tia mi konsilis akcepti la riskon kaj komenci taŭgan laboron. La kontraŭa plano

promesis nenion krom mizera ekzisto kelktempa kun malsukceso en la fino. Mi pruntedonis duonon de la kosto de la "tractor" kaj forte konsilis al la koloniantoj riski la planon de aktiva laboro. Mi argumentis ke eĉ se okazos la plej malbono kaj neniom plu da helpo venos el Eŭropo ili havus 50 akreojn da purigita tero plantita se ili plene uzus la "tractor" on ĝis la pluva sezono, kontraŭe se



Konstruanta la vojon tra a kolonion

ĝi restus neuzata ĉiu kolonianto havus nur la teron purigitan de siaj propraj manoj, nur unu akreon maksimume. Ankaŭ klare vidiĝis ke eĉ se ĉiu sukcesis purigi unu akreon la restanta monsumo ne sufiĉus por aĉeto de semoj kaj sterko. La koloniantoj konsentis ke ili devas akcepti la riskon. Ili decidis kulturadi laŭ komuna plano, aĉeti semojn kaj sterkon komunume kaj ĉiu ricevi

en la fino komunan parton de la rikolto-vendprezo kiam tio maturiĝos. Mialflanke mi promesis raporti la situacion al amikoj en Eŭropo, kaj ni komencis labori.

Estis meze de Aŭgusto kaj oni diris ke la pluvsezono komencas meze de Septembro. Restis unu monato dum kiu pretigi ĉion. (Efektive bonŝanco okazis al ni ĉar la pluvo ne venis ĝis dua semajno en Oktobro.) La unua neceso estis purigi la teron, aŭ tiom da ĝi kiom ebla antaŭ ol komenco de la pluvoj. En la altaĵoj de Kolombio purigo de la tero postulas duoblan procedon. Unue oni devas fortranĉi la kreskaĵojn. Tio estas tre malfacila tasko sed ĝi estas regula kaj oni povas kalkuli kiom estas farebla potage per naŭ viroj. Post tio la tero restas kovrita de senvivaj kreskaĵoj, velkantaj arboj, sekigantaj grimplantoj, kaj ofte dudekfutaj arboj tranĉitaj dum la procedo de la laboro. Tiuj devas estis forigitaj antaŭ ol oni povos komenci kulturi kaj la plej bona maniero estas lasi ĝin tute sekigi kaj poste forbruli ĝin. La pli pezaj ne facile forbrulas kaj devas esti fortrenita aŭ per mano aŭ per la "tractor", sed la aliajn aĵojn forigas la fajro.

Post purigo de peco da lando laŭ supraj metodoj la radikoj de la arboj devas esti elradikataj kaj tio kostas multe da mono kaj tempo. Oni povas elpreni la radikojn per la mano sed kun mano kaj hakilo oni ofte laboras du horojn ĉe unu radiko kaj fine ĝi restas firme en la tero. Kontraŭe se oni uzas la "tractor" kaj ĉenojn la radiko estas eltirebla en kelkaj minutoj. Tia uzo de la "tractor" estas multekosta (ni kalkulas ke purigo de unu hektaro kostas £1), sed ĉar devis esti pretaj antaŭ ol venos la pluvo ni ne havis alternativon. Ni purigis 10 akreojn per la "tractor" kaj tiam metis la masinon je dispono de plugistoj kaj erpistoj, dum la ceteraj laborantoj daŭrigis permane elradikon de la arbrestaĵoj. Tiu metodo konservis iom da mono, sed ne multe, ĉar la "tractor" tre rapide faris la laboron de plugado kaj erpado de 10 hektaroj dum ni manlaborante faris malmulte da impreson sur la teron manlaboritan. Estis konkuro inter ni kaj la "tractor" kaj kompreneble ĝi venkis!

Eble ŝajnas ke mi troparolas pri arbradikoj kaj la malfacilaĵoj de ilia forigo, sed estas tremulte da ili en nia tero en Pital. Dum unu posttagmezo, ekzemple, ni ŝarĝis dutunan trenveturilon kvinfoje per la radikoj eltrenitaj de la "tractor" el unu akreo da tero.

La plej proksima elspezo nun estis por fruktigiloj (sterko, k. t. p.) kiuj ĝis nun kostis £120 aŭ 1,250 pesoj. Estis grandega

elspezo, sed komencinte kulturi la teron estus malsaĝe se ni rifuzus provizi la nutraĵojn por la plantoj ni intencis kulturi. Analizo de nia tero montris ke ĝi estis plejparte produkta kaj bone taŭgas por kreskigo de terpomoj, verdaj legomoj, maizo, k. t. p. sed enhavas neniom da kalko. Estas ankaŭ parto de la tero bezonanta nitratojn kaj fosfatojn krom kalkon kiel la cetera. Ni decidis, pro



Eltiranta radikojn post fortranĉado de la kreskaĵoj  
Rudolf Messel partoprenas la laboron

manko de alternativo, lasi tiun pecon da tero el niaj kalkuloj (ni esperas post unu-du jaroj kreskigi "cabuya" tie) kaj aĉeti kvanton da kalko kaj tuj komenci sur la aliaj terpecoj.

Ni eksperimentis per alportado de bovsterkon de najbara farmo (distanco de naŭ mejloj sen vojo) sed trovis ke bezonis tri virojn kaj dek ĉevalojn por havigi kelkajn kvintalojn en unu

tago. La sterko estis utila laŭ kvanto sed ĝi estis malmulto. Kvankam ni ne devis pagi la farmiston la kosto en laboro de tri viroj (transigitaj al tiu laboro de necesa terlaboro) kaj en foraĝo por la ĉevaloj estis tro granda. Pro la ekonomia neeblo havigi la sterkon ni, post du tiaj penoj, decidis aĉeti 50 sakojn da nitrofosfata miksaĵo — plua, sed mi opinias, pravigebla elspezo.

Fine de Septembro du grandaj kampoj estis plugitaj, erpitaj kaj nutritaj per fruktigiloj, nur restis la laboro de semado. Ni komencis per maizo, ĉar tia greno bezonas proksimume naŭ monatojn por plena maturiĝo. La restaĵo de la tero estos plantita per terpomoj tuje post pretiĝo, kaj pli poste (ĉir. komenco de Novembro) ni aranĝis planti proksimume 1500 brasikojn plantojn.

La plilasta raporto el Pital montras ke dudek akreoj estas jam plantitaj per maizo kaj terpomoj post plugado, erpado kaj nutrado. Malgrandaj eksperimentaj kampoj (20 × 20 metroj) ankaŭ estas semitaj per trifolio, karvio, kaj fagopiro. Oranĝo-arbetaro ankaŭ estas aranĝita sed ĉar oni devas atendi almenaŭ du jarojn por frukto tio estas nur longtempa spekulacio (120 pesoj).

Frue en la jaro kiam kutime okazas seka periodo de 4 aŭ 6 semajnoj, oni atendas rikolti iom da terpomoj kaj de brasikoj ambaŭ estontaj aŭ vendeblaj aŭ manĝeblaj de la koloniantoj. Se, tamen, ni povas provizi la monon, sufiĉe por la vivrimedoj ĝis Julio de la proksima jaro, tiokaze dutrionoj da la nunjara rikolto estos uzablaj kiel semoj por la estonto kaj la monato de nepluva vetero povos esti uzata por intensiva preparo de nova tero. El mia scio pri la koloniantoj kaj la kondiĉoj en kiuj ili laboradas, mi certiĝas ke ili povus pretigi ankoraŭ dudek akreojn dum la Januara sekperiodo. Kiam la pluvoj rekomencos en Februaro estos 40 akreoj plantitaj per terpomoj. Eble pli! Tio estas minimuma kalkulo ĉar brasikoj certe estos replantitaj kaj oni povas supozi ke eksperimentoj faritaj de ni en plantigo de hordeo montros sin sukcesplenaj. Sed eĉ supozante ke estos nenio krom terpomoj kreskantaj sur la 40 kulturitaj akreoj, ni povas atendi rikolton de 5,000 sako (tre modera kalkulo) kaj ĉiu sako vendiĝos po 1 peso (normala prezo estas inter 1.50 kaj 1.80 pesoj) la kolonio posedos, fine de Aprilo, 5,000 pesojn (8.50 egalas £1). Kiam la koloniantoj havos tiom de kapitalo je sia dispono, ili povos plani la laboron de la proksima jaro kaj samtempe havi sufiĉe por subteni la vivon de la koloniantoj ĝis la maturiĝo de la rikolto

proksimjara. (La maizo-rikolto estos en Julio, sed tio estas malgranda ero en la programo kaj plej kredeble estos uzata por nutri la ĉevalojn kaj kokidojn jam vivantajn en la kolonio.)

Se la kolonio en Pital povas havigi nun £1,000 ĝi ne nur liberiĝos fine el monmankoj, sed trovos sin en situacio por komenci lakto-produkton (£100 aĉetus 12 bonajn bovinojn) kaj ankaŭ kreskigon de fruktoj kaj cabuya. Cabuya estas kaktosimila planto kies fortaj blankaj fibroj estas uzataj en Kolombio por sakofabrikado. Kolombio produktas grandajn kvantojn da kafo kaj



La Maizo-kampo — La kreskaĵoj estas nun duoble altaj

uzas du milionojn da sakoĵ ĉiujare. Cabuya kulturo estas klare bona komerca propono sed la plantoj bezonas kvar jarojn por la maturiĝo kaj kompreneble niaj koloniantoj ne povas investi en tia spekulacio ĝis kiam ili posedos pli da kapitalo.

Aferoj estus pli feliĉaj por la koloniantoj se ili havus sufiĉe da mono por konstrui halon centran en kiu oni povus ĝui iom da sociaj interrilatoj en la vesperoj kaj la semajnfinoj. Nuntempe ne troviĝas en Pital ia halo kaj ĉiuj diskutoj devas okazi subĉiele kaj estas limigitaj al la afero de la momento. Ni kutimis kunveni por diskuti la laboron de la proksima tago kaj la proksima semajno

kaj poste tuj disiĝi. Ciu ŝatus resti de tempo al tempo por interparoli pri aliaj aferoj nerilataj al la rigidaj necesajoj de nia laborega vivo. Je bela vespero ni kelkfoje ĉirkaŭ-sidiĝis en la lunlumo kaj okaze je semajnfino ni premis sin en unu aŭ alia de du pligrandaj ĉambroj. La maksimuma mezuro estante 12 x 8 futoj; la samtempa ĉeesto de 15 homoj sufiĉe plenigis ilin. Ofte devis esti maloportune por la ĉambroposedantoj kiuj ne povis enlitiĝi ĝis la foriro de la grupo, sed ili estis tro ĝentilaj diri tion.

Ankaŭ estas la demando pri akvo. Nuntempe, ĉiu guto da akvo, ĉu por lavado, trinkado, kuirado aŭ malsekigo de la kulturita tero, estas levigata el putoj. La putoj kuŝas 12 metroj sub la tero. Unu posttagmezo en la seka sezono ni levigis 80 sitelojn da akvo por niaj brasikaj plantoj sole. Pli poste ni devis havigi pli por lavado, kuirado kaj trinkado.

Fluanta akvo kaj klubdomo estas luksaĵoj sen kiuj la kolonio povas vivi. Ni ne petas tujan helpon por provizi pluvbanejon, aŭ eĉ lokon kie oni povus sidi por legi aŭ ludi ŝakojn en komforto. Ni, tamen, ja bezonas monon por helpi nin travivi la proksimajn tri monatojn, kaj se tio estas trovebla rapide, mi estas certa ke la kolonio povos sufiĉe pligrandigi sian produktkapablon por ke ĉiu el la dudek kvar koloniantoj ĝuu sanan, feliĉan kaj sekuran ekziston.

Mi sentas ke Pital kolonio meritas helpon, unue ĉar ĝi travivis grandajn malfacilaĵojn, due, ĉar ĝi sukcesis travivi kaj estas unu el la nur kelkaj kolonioj de Germanaj rifuĝantoj kiuj estas efektive starigitaj en fremda lando. Mi sentas, ankaŭ, ke tiuj koloniantoj, se ili povas esti helpataj tra la nuna periodo de siaj malfacilaĵoj, povos esti nukleo de vere granda plano de koloniado en la sama distrikto. Tero estas abunde havebla en la najbaraĵo de Pital, ĝi estas fruktdona, nur unu horo for de la fervojo, kaj en saniga klimato. Estus perfekte eble fari grandan kolonion en tiu distrikto, kaj se ĉi tiu plano tia efektiviĝos la helpo kaj konsilo de koloniantoj kun unu jaro da sperto "sur la loko" estus nealkaleble valora al novaj alvenantoj en Kolombion kaj al la organizantoj en Eŭropo.

---

ESK

ME